



# BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

IM SOZIALWERK DER DEUTSCHEN BUNDESBahn

Numero 3 • Majo/Julio 1961

## Kio okazis en la 13a kongreso?

Ĉi-jare estas mia ĉefa tasko, skribi pri la laborparto de la 13a IFEF-kongreso. Sed ne timu, ke ĝi estos nura konglomerato de sekaj sinsekvajoj. La instigaj vortoj de prezidanto de Jong, kiujn li direktis al la ĉeestantoj de la inaŭguro, celis ne malpli ol vigligi la diversajn kunsidojn. Vigligi por ĉiuj, ĉu aktivaj, ĉu pasivaj partoprenantoj, ĉar tute certe por la delegitoj estas multe pli agrable kaj inverse pli fruktodone por la geaŭskultantoj, kiam la diskutoj ne okazas antaŭ malplenaj seĝoj. Mi do provu fabriki ion ĝenerale interesan.

Ni komencu ĉe la inaŭguro, kiu ĉiujare eĉ por malnovaj kongresanoj alportas diversajn neantaŭviditajn kulminojn. Same ankaŭ ĉi-foje. Gojige por la okuloj, ke la salonego estis tutplena, malĝojige, ke multaj ne trovis lokon en ĝi. Sed apenaŭ la LKK, kiam ĝi ekpreparis la kongreson, povis antaŭvidi la rekordan numeron de 750 partoprenantoj. Cetere tiuj venis el nur 13 nacioj, ĉar pro diversaj kaŭzoj la kolegoj el la landoj Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio kaj Polio ne povis ĉeesti. Bedaŭrinde, ĉar Esperanto servas al la paco, kiun laŭdire ĉiuj volas. GEFA okupis la pinton laŭ la nombro de kongresanoj, nome 143, antaŭ Hispanio kun 109, Aŭstrio kun

108 kaj Francio kun 98 anoncitoj. Kompreneble inter ili troviĝas multaj, kiuj ja pli malpli deziris eluzi la avantaĝojn turismajn de tia kongreso, sed kiuj neniam estis videblaj en labo:arangoj. Sed reen al la inaŭguro. La salono bedaŭrinde prezentigis tute neornamita. Eĉ ne flagon oni povis vidi. Kaj kiel facile kelkajn belegajn florojn ne tro multekostajn oni estus povinta havigi al si en la proksima Rambla de las flores!

Prokrastiĝis la komencigo je 45 minutoj. Ĉu malagrabla? Nu, parte, parte. Tiu ĉi hispana kutimo, komencigi ĉiujn arangojn ofte konsiderindan tempon tro malfrue, ankaŭ havas avantaĝojn, ekz. oni neniel sukcesas veni tro malfrue. Ĉiam ankoraŭ restas tempo por babili, trinki ion, skribi poŝtkarton ktp. La plej ŝatatan hispanan vorton „mañana“ (morgaŭ) ankaŭ ni praktikis sufiĉe ofte. Pro tio ni baptis tiun kongreson „la kongreso de la atendado“. Oni tamen ne imitu tion estontece.

Post muzikaĵo salutis unue la prezidanto de LKK, s-ro José Saladrigas. Parolis i. a. D-ro Ramos por la ministro de informo, s-ro Vicente García Rives (nacia sindikata estro pri transportoj) kaj s-ro José M-a Perxés, direktoro de la 5a zono



La kongresejo

Foto: Giessner



de RENFE, kiu substrekis la eblecojn, kiujn donas Esperanto al la fervojistoj por interrilatiĝi. S-ro Perxés samtempe anstataŭis s-ron Agustín Plana Sancho, prezidanto de la administracia konsilantaro de RENFE. Ili ĉiuj parolis en hispana lingvo, sekvis do tradukojn en Esperanto kaj inverse, kiam la parolantoj parolis esperante, iom teda kaj temporaba metodo. En Esperanto-kongreso laŭ mia opinio ne estas malĝentile eĉ al altrangaj gastoj, se oni nur **laŭsence** tradukas la **plej gravajn** paroladojn.

Forte aplaŭdita estis la kvazaŭ festa parolado de la prezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio, d-ro Rafael Herrero. Kortuŝe li akcentis la varmon de la amikeco inter la esperantistoj kaj recitis poemojn. Ankaŭ en hispana lingvo li rekte alparolis la eminentajn gastojn, kaj evidente sukcesis konvinki ilin pri la valoro de la Internacia Lingvo. Post li la hispana reprezentanto de UNESCO, s-ro Johano Alsamora Fusté, esprimis sian ĝojon pri la fakto, ke li povis saluti kongreson, kiu kapablas interkompreniĝi laŭ natura maniero. Li emfaze deklaris, ke li intencas lerni Esperanton. Multon li povis kompreni el la antaŭaj paroladoj kaj opiniis, ke Esperanto estas taŭga kiel komuna lingvo por ĉiuj eŭropanoj. Ankaŭ Lia Ekscelenco, s-ro Ignacio Rubio Cambrero, ĝenerala arki-visto de la provinca deputitaro, montris sin forte impresigita kaj postulis universitatajn katedrojn por Esperanto.

Parolis krome d-ro Aragay, prezidanto de la hispana Esperanto-Instituto, reprezentantoj de UEA kaj SAT kaj poste la delegitoj de la landaj asocioj.

Malfermis finfine kaj kiel kutime la kongreson la prezidanto de IFEF, kol. de Jong. Sed kurioze, ankoraŭfoje oni malfermis ĝin flanke de hispana eminentulo. Krome estus rekomendinde por venontaj kongresoj, ke LKK petos la nomojn de la landaj parolantoj sufiĉe frue kaj komplete kaj ke minimume unu LKK-ano ĉeestos antaŭ la fiksita komenctempo, por gvidi gastojn kaj delegitojn al iliaj sidlokoj. Estis denove videblaj viraj ĉeestantoj, kiuj vizitis la **solan** malfermon sen jako, sen kravato, eĉ kun suprenfalditaj manikoj. Ĉu tio ne estas iom da malhonoro al la eminentaj gastoj, al la severaj kutimoj de la gastlando kaj same al nia afero mem? Certe oni povis elteni la varmecon ankaŭ kun jako. La neesperantistoj ja prijuĝas nin ĉefe laŭ tiaj eksterajoj!

Antaŭ ol paroli pri la kunsidoj, oni ne povas preterlasi la momenton, por plendi pri la salutarubandoj ĉirkaŭ la kongreseja parko. Ili tekstis: „Bonvenon al Hispanio, Pepsi-Cola salutata vin“. Sur unu flanko troviĝis la verda stelo, sur la alia la konata Pepsi-Cola-reklamo. Tute klare, ke tio helpis al la kongresa kaso, sed ĉu estas necese, ke la Pepsi-Cola-emblemo samrajte kun la verda stelo „ornamas“ la bonvenajn vortojn por la kongresanoj kaj ke tiuj nepre devas esti salutataj

flanke de Pepsi-Cola? Ie devas esti limo por la bongusto. Se ne ekzistas sufiĉe da mono, estus pli saĝe rezigni je tiaj „salutoj“.

Okazis tri kunvenoj, pri kiuj en ĉi tiu raporto estu dirata nenio, nome la kunsido de la estraro kun la landaj delegitoj, la redaktora kaj la terminara kunvenoj. Pri ili oni legos en la internacia organo.

La kunveno de la fakprelega komitato ne okazis, ĉar nek estis tempo nek necese. Ĝia gvidanto, kol. Giessner, donis raporton pri la lastjara agado dum la laborkunsido.

La **laborkunsidoj** estas relative bone vizititaj, kvankam samtempe okazis allogaj ekskursoj kaj briladis la suno al ni mezeŭropanoj preskaŭ ne plu konata. Por kompreni la sekvantajn liniojn, la leganto estas petata, preni „La Internacia Fervojisto“ n-ro 1/61, en kiu sur paĝo 7 staras la tagordoj. La punktojn 1 ĝis 4 ni preterlasu. Sub pkt. 5 mi menciis, ke laŭ la redaktora kunveno oni prokrastos la decidon pri **nova titolkapo de LIF** ĝis la venonta kongreso. Ĉar ni ĉiuj estas laikoj, oni espereble lasos la finfan dezegnadon al profesia grafikisto kaj rigardos la rezulton de la momenta enketo, farita ĉe la landaj estraroj, nur provizora.

Sub punkto 6 sekvis la raporto pri la **fakprelegaj aferoj**. Evidentiĝis en la pasinta jaro, ke la solvo, trovita en Helsinko, montris sin bontaŭga. Post multfoja korespondado inter la gvidanto de la komitato kaj LKK estis verkita fakprelega teksto ĉerpita el diversaj fontoj kaj sufiĉe interesa por ĉiuj aŭskultantoj sub la titolo „La problemoj de la larĝa ŝpuro, precipe en Hispanio“. La iom tro longa teksto estis nove verkita laŭ lingvaj kaj objektivaj vidpunktoj flanke de la gvidanto de la Terminara komitato, kol. Ritterspach, kaj finfine kompletigita de s-ro Escartin, eminentulo de la hispanaj fervojoj en Madrid kaj malnova esperantisto. La spertoj en la preparado de tiaj prelegoj fariĝas iom post iom pli grandaj kaj certe ebligas al la estontaj LKK-oj pli facilan laboron ĉi-riilate. Kol. Giessner substrekis en sia raporto, ke nepre estas necese mikrofono kaj laŭtigiloj, kion ĵus denove pruvis la fakprelego en Barcelona, kie la preleganto spite al bonega prelego ne de ĉiuj povis esti komprenata, ĉar li ne povis laŭte paroli. La prelego en la venonta kongreso antaŭvideble temos pri la senbreĝigo de la reloĵ.

Sekvis la pritrakto de la **kongresproponoj**. La proponojn 1, 2 kaj 3 oni sen longaj vortoj akceptis. Pri la kvara oni jam estis diskutinta dum la delegitara kunveno. Montriĝis, ke tiu problemo ne estas matura, precipe ĉar mankas ankoraŭ la terminaro. Pro tio la IFEF-estraro prenis la proponon. La 5a kaj 6a proponoj, faritaj de GEFA, oni povis kune trakti. Ambaŭ estas akceptitaj. Delegitoj kaj estraro rigardis la proponojn necesaj, ja kol. Ritterspach eĉ sugestis, ke IFEF krome havu je dispono specialan laŭtigilon kun baterio,



kiu estos uzbla en tiaj situacioj (ekz. ekskursoj), kiam la homa voĉo devas esti ege streĉata. La celon de la du proponoj oni povas ekkoni el la komentarioj en LIF, kaj GEFA deklaris sin preta, finance helpi en ilia realigo. Ni do esperu, ke en venontaj kongresoj troviĝos sufiĉe da teknikaj instalaĵoj, kiuj ebligos senriproĉan komprenadon de ĉiuj paroloj. Necese estos sendube, ke respondeculo tenos en siaj manoj la fadenojn, por ke la afero daŭre funkcii kaj evoluu. Nia kolego Ritterspach konsentis, ankaŭ ĉi tiun taskon preni sur siajn ŝultrojn, kaj jam nun li meritas dankon pro tio. La sepan proponon ni mem reprenis, ĉar el LIF n-ro 1/61 (lasta paĝo) estas ekkonebla la principa realigo de nia propono.

Kvankam la 8a punkto de la tagordo — estrar-elekto — relative rapide estas traktita, oni ne trompu sin pri ĝia graveco. La situacio en la IFEF-estraro de kelka tempo fariĝas pli kaj pli tikla pro la aĝo de ĝiaj anoj. Jam de jaroj la estraro laboras kun 5 anstataŭ 7 membroj spite al la daŭre kreskanta membronombro de IFEF. La sekretario en 1959 emeritiĝis, kaj en ne tro longa tempo ankaŭ la prezidanton kaj redaktoron trafos la sama sorto. Tamen estas necese, ke la movado estas gvidata de aktivaj fervojistoj. La nederlanda sekcio ne plu kapablos disponi el siaj vicoj la kompletan IFEF-estraron. Sekve estontece la estraro devos esti formata el personoj de diversaj landoj (pro tio la kongrespropono n-ro 2). Post preparo en la delegitarkunveno oni do decidis, ke la unua paŝo estos la ŝanĝo inter la funkcioj de la 1a kaj 2a sekretarioj tiel, ke kol. Poptie laboros kiel unua kaj kol. Lok helpos al li per siaj longjaraj spertoj. La celo estas, ke kol. Poptie definitive fariĝos 1a sekretario en 1962. Tamen poste denove devos esti serĉataj aliaj estraranoj kaj ni esperu, ke pro la bono de nia faka movado taŭgaj kaj bonvolaj kolegoj estos trovemblaj. La danĝero ne estas malgranda.

Ĉi-rilate mi menciis, ke la komisiono por estraraferoj estas likvidita, ĉar oni momente ne rigardas ĝin necesa. La estraro mem aktivigos la problemon.

Sub punkto 11 oni decidis pri la **konkreslokoj** de la venonta jaro (Budapest) kaj provizore por 1963, verŝajne Stoke-on-Trent en Anglio. Por 1964 estas antaŭvidebla Bruxelles. Diversajn demandojn pri la antaŭpago de mono, pri la devigaj potagaj elspezoj, pri vizkotozo en Hungario ktp. la estraro esploros kaj sciigos la rezulton pere de LIF.

Restas ankoraŭ la akceptoj, jes la multnombraj akceptoj. Estis entute kvar, kio ĝis nun neniam okazis. La unuan aranĝis la fervoja direkcio dum lundo. Landaj kaj fakaj gedelegitoj estas akceptitaj flanke de s-roj Perxés, Rubio, Montagut (ĉefinĝ. de la fervoja direkcio) kaj Matilla (estro de la komerca fervoja departemento). La atmosfero estis afabla kaj oni povas esperi, ke ankaŭ la

hispanaj kolegoj profitos el ĝi. Danke oni prenis la donitajn frandaĵojn kaj bongustajn vinojn. Interese estas, ke oni oficiale postulis scii la deĵorajn rangojn de la delegitoj.

La dua akcepto estis merkredon en la urbo-domo flanke de la urbestro de Barcelona. Proksimume 150 gekongresanoj ĉestis, rigardis la belajn pentraĵojn en la salonoj kaj plezure gustumis la regalajojn. Tamen oni devis bedaŭri, ke la urbestro ne trovis la tempon alparoli la venintojn.

Tria akcepto okazis en Tarragona. Ĝi estis sendube la plej efika kaj solena. Estis nur domage, ke multaj ne trovis lokon en la salono. Sendube ĉiuj estis surprizataj, kiam ne nur eniris la urbestro, s-ro Francisco Sugrañes Perello, sed ankaŭ la hispana generalo Sabas Navarro Brinsdon kaj la kardinalo de Katalunio, eminenco Benjamin de Arriba y Castro. Tutcerte neniam en la historio de IFEF en iu ajn publika akcepto la gastigantoj estis tiam eminentaj. La vortoj de la urbestro kaj de la kardinalo venis el koro kaj forte ili estis aplaŭditaj. La kardinalo deziris aŭdi nian himnon, kaj poste li donis la ekleziajn benon kaj la salutojn de la Sankta Papo. Ni ankaŭ ne forgesu ĉi-loke la inspektoron de nacia edukado, Evelio Calvet Prats, kiu en bonan Esperanton tradukis la vortojn de la aliaj kaj en hispana lingvo klarigis al ili la sencon de Esperanto.

Ankoraŭfoje la saman tagon la delegitoj travivis akcepton flanke de la urbestro de Villafranca, la urbo de la belega vinmuzeo, en la persono de s-ro Barqué Arnando. Oni sendube rajtas diri, ke el ĉiuj tiuj akceptoj montriĝis la hispana gastamo kaj afableco, kiujn ni ĝuis kun profunda danko. Admirinda estis la granda laboro, kiun faris la Esperantogrupon en Villafranca, kiu estis tradukinta multajn rimarkigojn en la vinmuzeo.

Nur unu horon poste ankoraŭfoje okazis oficiala afero, nome la „Solena fermo“ de la kongreso, same en Villafranca. Centoj da kongresanoj travivis la lastajn minutojn de la kongreso kaj aŭskultis la vortojn de s-ro Plana Sancho, kiu precipe pro tiu okazo estis veninta, kaj de la IFEF-prezidanto de Jong. Estis pli ol kurioze, ke pro iu miskompreno ankaŭ la formala kongresfermo okazis dufoje same kiel la malfermo. Se eble la LKK-oj de estontaj kongresoj malhelpu tion.

Fine ankoraŭ vorton pri la laboro de LKK. Kun plena respekto ni admiris la agadon de niaj hispanaj kolegoj, kiuj kuragiis organizi kongreson, eĉ kun tia rekorda nombro de partoprenantoj, kiuj spite al la plej diversaj obstinaĵoj kaj melhelpaĵoj tamen ne „ĵetis la pafilon en la grenon“, sed ofte tage kaj nokte laboris kaj eĉ oferis siajn feriotagojn por nia bonfarto. Pro tio ni forgesos tion, kio ne glate funkciis, sed konservos en nia memoro la varmecon de la lando, de la suno, de la koroj. Kaj ĵus pro tiu agrabla, afabla varmo ni ŝuldas dankon al niaj hispanaj amikoj. Giessner



## Wesentliches vom Kongreß in Barcelona

Vom 6. bis 12. Mai 1961 hielten die Eisenbahner-Esperantisten in Barcelona ihren diesjährigen internationalen Kongreß ab. Er war verbunden mit einem Nachkongreß in Palma de Mallorca. Das südliche Land hatte viele Kollegen und Angehörige angezogen, so daß die **bisher höchste Beteiligung** mit rund 750 Personen erreicht wurde, obwohl sämtliche Landesverbände hinter dem eisernen Vorhang ausfielen. Ihre Angehörigen hatten von Spanien keine Visa erhalten. Das war um so bedauerlicher, als Esperanto der Verständigung und dem Frieden dient, den alle wollen. Deutschland lag mit 143 Anwesenden an der Spitze.

Wie immer war die **feierliche Eröffnung** eines der wichtigsten Ereignisse. Aus der großen Zahl der Redner seien hervorgehoben:

**Dr. Ramos**, der für den Informationsminister sprach;

**Direktor Perxés** von der 5. Sektion der spanischen Eisenbahnen (RENFE). Er vertrat auch den Präsidenten des Verwaltungsrates der RENFE, Herrn **Plana Sancho**, und fand sehr freundliche Worte für Esperanto;

Herr **Alsamora Fusté** als spanischer Beauftragter der UNESCO. Er war von der vorhergegangenen Rede des Präsidenten des spanischen Esperanto-Verbandes, **Dr. Herrero**, so stark beeindruckt, daß er erklärte; selbst Esperanto lernen zu wollen;

**Seine Exzellenz I. Rubio Cambronero** forderte Lehrstühle für Esperanto an den Universitäten. Außerdem sprachen Vertreter des Allgemeinen Esperantobundes (UEA) und die Delegierten der Landesverbände. Zum Schluß eröffnete der Präsident der Internationalen Vereinigung der Eisenbahner-Esperantisten (IFEFF), **de Jong**, den 13. Kongreß.

An den folgenden Tagen fanden eine Reihe von **Besprechungen** und Arbeitssitzungen statt, nebenher aber auch **Ausflüge** nach verlockenden Zielen wie z. B. nach dem berühmten Wallfahrtskloster Montserrat, zum „Spanischen Dorf“, zur Besichtigung moderner Arbeitersiedlungen, einer Nahrungsmittelfabrik, zum RENFE-Ausbesserungswerk u. a. Im Kongreßprogramm waren außerdem ein Konzertabend, ein Volkskunstabend, ein internationaler Ball und ein ganztägiger Ausflug nach Tarragona und Villafranca vorgesehen.

Im Kongreßgebäude, das inmitten eines wunderschönen Parks gelegen war, kamen unterdessen der Vorstand und die Länderdelegierten zu einer Sitzung zusammen. Auch die Redakteure der Länder besprachen ihre besonderen Probleme, und wichtig vor allem: das „Terminara komitato“ tagte, der Ausschuß für die Herausgabe eines

**Eisenbahn-Fachwörterbuches**. Von diesem Wörterbuch, das in Anlehnung an den Wortschatz des bekannten UIC-Wörterbuches von besonders ausgesuchten Kollegen in verschiedenen Ländern in zeitraubender, mühevoller Kleinarbeit zusammengestellt wird, dürfte eines Tages die Entwicklung unseres internationalen Verbandes weitgehend abhängen.

Ein anderer wesentlicher Bestandteil unserer Kongresse sind die **Fachvorlesungen**, deren Thema jeweils in Beziehung zum Gastland steht. Es lautete dieses Mal: „Die Probleme des Spurenswechsels, besonders in Spanien“. Vortragender war der RENFE-Tariffachmann Rodriguez Escartin, der eigens aus Madrid gekommen war. Selbst seit 40 Jahren Esperantist, machte es ihm sichtlich Freude, vor so vielen Sprachfreunden vorzutragen zu können. An solch einer Vorlesung über ein fachliches Thema kann man am besten beobachten, wie vorteilhaft die internationale Sprache Esperanto bei übernationalen Konferenzen der Eisenbahn-Verwaltungen verwendet werden könnte, wieviel Zeit und damit Geld die direkte Verständigung sparen würde. Fürwahr, das wäre echte Rationalisierung. Ein Resümee des Vortrags in deutscher Sprache folgt im nächsten Buleno.

In den eigentlichen **Arbeitssitzungen** wurden verschiedene Probleme behandelt, von denen hier nur der vom deutschen Landesverband eingebrachte Vorschlag erwähnt sei, wonach in künftigen Kongressen mehr von technischen Hilfsmitteln wie Mikrofonen, Lautsprechern und Tonbändern Gebrauch gemacht werden möge. Dieser Vorschlag wurde einstimmig angenommen. Auch interne Veränderungen im internationalen Vorstand wurden gebilligt. Der nächste Kongreßort im Mai 1962 ist Budapest, die voraussichtlichen Tagungsorte für 1963 und 1964 dürften Stoke-on-Trent (England) und Brüssel sein.

Schließlich seien noch einige **Empfänge** erwähnt, die erkennen lassen, daß die Internationale Sprache mehr und mehr beachtet wird. Die Delegierten wurden empfangen vom zuständigen **Präsidenten der RENFE** in Anwesenheit der Herren Perxés, Rubio, Montagut und Matilla, von der Stadt Barcelona, in beiden Fällen verbunden mit einem Imbiß, von der Stadt Tarragona in Anwesenheit des Stadtoberhauptes, des zuständigen Armeegenerals Navarro und des Kardinals für Katalonien, Benjamin de Arriba y Castro und zuletzt von der Stadt Villafranca.

Die spanische Eisenbahnverwaltung stellte für die Fahrt der Kongreßteilnehmer vom Grenzbahnhof Port Bou nach Barcelona und für den Ausflug nach Tarragona in großzügiger Weise einen Sonderzug zur Verfügung.

Der Nachkongreß wurde im Rahmen des na-



## Sub la favoro de la hispana suno

La 13a IFEF-kongreso en Barcelona staris sub la favoro de preskaŭ somera vetero. Tio estis tre feliĉa kondiĉo por la sukceso de la kongreso, por la bonhumoro de la partoprenantoj kaj por la studado de la regiono dum komunaj ekskursoj aŭ dum neprogramaj promenadoj. En aliaj partoj de Eŭropo ja ne estis same bonaj veterkondiĉoj! Verŝajne estis aparteninta al la laborprogramo de LKK ĉiutaga insista petpreĝo, ke la patronino de Katalunio, la mondfama Nigra Madono de Montserrat, kunhelpu, por ke la kongreso fariĝu „sunbrila sukceso“. Kaj ĝi vere fariĝis!

Por digne akcepti la gastojn, la hispana fervoja administracio disponigis al LKK specialan trajnon. Niaj fervoraj hispanaj amikoj bele ornamis ĝin, kondukis ĝin al la hispana-franca landlimo (Port Bou) kaj ĝentile prezentis al ĉiuj sinjorinoj bukedon da bonodorantaj diantoj — jen la saluto, la unua demonstracio de la gastama hispana animo!

La kongresejo, videbla sur la frontpaĝo sub la ornamo de flirtantaj flagoj, estis digna loko por nia internacia kunveno. La ĉefsalono estis ornamita per belegaj afiŝoj sur la muroj, indikantaj la lokojn kaj jarojn de la antaŭaj IFEF-kongresoj. En apuda ĉambreto „reĝis“ la membroj de LKK, donis informojn, vendis glumarkojn kaj alian Esperanto-materialon kaj gardis la donacitaĵojn por la tombolo. En alia apuda loko estis starigita speciala leterkesto, kiu avide englutis la amason da salutkartoj kaj leteroj, kiuj vojaĝis en la tutan mondon, ekipite de speciala poŝtservo per speciala stampo cirkloforma kun la hispanlingva teksto „Kongreso Ferroviaros Esperantistas — Barcelona“, presita super la desegno de relvojo.

Dum la „Interfratiga vespero“ regis en la kongresejo granda bruo — ĝojo pri revido de malnova aŭ konatiĝo kun nova samideano, konversacio aŭ babilado, muziko kaj dancado en tuteŭropa rondo, interligita per la komuna lingvo Esperanto kaj per speciala komuna kongresinsigno sur la brusto, duplikato metala de la konata kongresglumarko. Tiu pinglo restos bela rememoraĵo al la impresdonaj kongresokazaĵoj kaj -travivaĵoj. — La sama bruo regis pli poste okaze de la „Internacia balo“, kiam granda temperamentplena dancorkesto fervore zorgis pri la ritma intermikso de kruoj kaj brakoj sur inter-

nacia pargeto. Tamen, kiel kutime, la tombolo iom ĝenis la balon.

La hispanoj ŝajne ŝatas la bruon, same tiun de la muĝanta maro kiel tiun de ĝojplenaj homoj. Konversacion ili volonte faras per laŭta voĉo kaj forta gesto. Ili amas la belsonon de la vorto, de la muziko, la ritmajn movojn dum danco. Kio estas vera hispana dancmaniero, ni ja vidis dum la „Interfratiga vespero“ kaj dum la ekskurso al la tiel nomata „Hispana vilaĝo“ en Barcelona — perdanca reprezentado de la popolkaraktero de la diversaj hispanaj provincoj. Neforgeseblaj la belegaj kostumoj folkloristaj, neforgesebla la beleco de la dancmovoj de la grupoj aŭ unuopaj paroj! Temperamento, temperamento! Ritma klakado per la manoj, per la piedoj, per kastanjetoj, muzika akompano per gitaro — jen la tipaj ritmiloj hispanaj! Kaj la beleco alloga de la nigraharaj diablinoj dancantaj — ho, ni prefere silentu!

La tipa popoldanco de Katalunio, la kongresregiono, estas la „Sardana“. Kiam ni, post la solena malfermo de la kongreso, iretis al la katedralo, por ke la tuta kongresanaro tie estu fotografata, ni renkontis nepretervideblan malhelpaĵon. La tuta placo antaŭ la katedralo estis okupita per dancantaj hispanoj. Blovorkestro aŭdigis belsonajn trankvilajn ritmojn, kaj oni vidis multajn, pli aŭ malpli grandajn cirklojn da elegante ronddancantaj homoj, sin tenantaj ĉe la manoj. Vere, eksterordinare plaĉa popolkutimo — kaj tio en grandurbo kiel Barcelona! Ne tiel plaĉa, ĉar „tro sangoversa“, estas alia tipa hispana popolkutimo, la taura festo, kiun travivi multaj gekongresanoj kompreneble ne preterlasis.

Barcelona estas urbo kun superriĉa akordo de diversaj malsamaj aspektoj. La diverseco ne signifas, ke la urbo ne formas unu grandan unuecon. Tamen ekzistas en la mondo nur malmultaj ĉefurboj, kiuj prezentas tiel multaj malsamaj impresoj, kiel Barcelona inter la haveno kaj la monto Tibidabo. — Simbolo de la urbo estas sendube la bulvarado „Rambla“, kie „trankvile bruas“ la vivo sub platanoj, speciale dum la nokto. Ĝi estas iama riverlito, kondukanta de la interno de la urbo al la haveno, kie la granda kolono de Kolumbo salutas la bluan muĝantan maron. La „Rambla“ dividas la urbon en du partojn. Je la unu flanko situas la katedralo kaj la gotikaj preĝejoj, loĝas la komercistoj de antikvaĵoj kaj religiaj librejoj, dum je la alia flanko troviĝas la kvartaloj de la laboristoj kaj la noktamuzejoj (la t. n. barrio chino = ĉina kvartalo, kvankam ĉino ne estas videbla tie). Cetere, la noktoj de Barcelona ĝuas mondfamon! — La „Rambla“ finiĝas, kiam oni komencas promeni de la haveno, en la „Plaza de Catalunya“. Tie sin renkontas la subteraj fervojoj,

tionalen Kongresses der spanischen Esperantisten in Palma de Mallorca abgehalten. Er führte einen großen Teil der europäischen Kollegen nochmals zusammen. Bei herrlichem Sonnenwetter wurde gebadet, und auf mehreren Omnibusausflügen war Gelegenheit, die einzigartigen Schönheiten dieser Mittelmeerinsel kennenzulernen. Giessner



tie estas la limo inter la malnova kaj la nova urbo. Eksterordinare reprezentativa ronda placo kun belegaj fontanoj, verdaĵoj, mozaikpavimo! Ekzistas en Barcelono multaj aliaj belegaj placoj, historiaj konstruaĵoj, monumentoj kaj ĉiuj specoj de stratoj, stratoj, bulvaroj, avenuoj, la plej impona inter ili la „Avenida del Generalísimo Franco“, kondukanta al la ĉefurbo Madrid.

Se oni venas al Barcelono de la flanko de la maro aŭ de la orienta landvojo, la okulo estas frapita de kvar turoj, kvazaŭ cipresoj el ŝtono. Temas pri la neniam finkonstruita preĝejo „Sagrada Familia“ (sankta familio) de Antonio Gaŭdi, arkitekturo el Tarragona, kiu donis per multaj aliaj propratipaj konstruaĵoj apartan aspekton al Barcelono. Tiu preĝejo estis tre interesa celo de aparta ekskurso.

Pluaj celoj de laŭprogramaj ekskursoj estis la montoj „Montjuich“ kaj „Tibidabo“. Imagu la imensan karavanon de aŭtobusoj kun pli ol 700 pasaĝeroj! Niaj hispanaj kolegoj batalis kiel matadoroj, por venki tiun „grandegan taŭron“. — De sur la montoj oni havas imponan panoraman rondrigardon al la blua maro, la verda pejzaĝo, la flava-ruĝa regiono de la grandurbo. Sur la pinto de „Tibidabo“ la koloso de preĝejo strebas al la ĉielo, kaj en la ĉirkaŭo sin turnas la vizitantoj en la karuselaj konstruaĵoj de amuzparko. Granda kontrasto, trovebla en Hispanio tiel multe — kombino inter la tero kaj la ĉielo! — Dum la vespero, post tiu neforgesebla travivaĵo sur la montoj, la kongresanaro denove kolektiĝis, por ĝui la programpunkton „Koncerto“, prezentata de la orkestro „Gran Palace“. Ekscelenta prezentado de same ekscelentaj programeroj, tamen bedaŭrinde ĝenata per la sidado ĉe tabloj kun la ebleco aŭ neceso, doni sian mendon al la kelneroj. Per tio tro granda bruo kaj malatento!

La programpunkto „Amuza vespero“ ne donis tion, kion ĝi promesis. La afero, nome, estis tute ne amuza. Oni prezentis filmojn el la fervoja laborvivo. La filmoj, cetere, estis de mezgrada kvalito. Kial ne nomi tiun vesperon simple „Filmvespero“?

Dum la peraŭtobusa ekskurso al la supre menciitaj montoj donis impreson pri la proksima ĉirkaŭaĵo de Barcelono, la tuttaga, alterne perfervoja kaj peraŭtobusa ekskurso al la pli suda antikva urbo Tarragona kaj al la vinurbo Villafraŭca peris impreson pri unu parto de la iom pli malproksima ĉirkaŭaĵo de nia kongresurbo. Ĉe Tarragona ni vizitis muzean enterigejon el la frutempo de la kristanoj kaj modernan, ĉe la maro situantan laboristan universitaton, kie junuloj ricevas, je ŝtataj kostoj, instruon pri multspecaj teknikaj fakoj. Ankaŭ Tarragona posedas kompreneble sian „Rambla“ — kun palmoj, la tuta urbo sur altaj rokoj. Impona la katedralo! En la stratoj nigraharaj homoj en solena nigra vestaĵo, knabinoj vestitaj per blankaj roboj kiel fianĉinoj, knaboj per

blankaj uniformoj kiel oficiroj de la marino — estis la festo de Ĉieliro kaj de la unua komunio! En Tarragona mem kaj norde de ĝi etendiĝas longaj plaĝoj, invitantaj al refreŝiga bano. Bedaŭrinde ne restis sufiĉe da tempo por tio, kaj ni devis elteni la brilajn sunradiojn sen bano, sidante en ampleksa strandhotelo sur la teraso aŭ aliaj disponeblaj lokoj, por atendi la komunan tagmanĝon. Kaj ni atendis longe, longe! Tro malpli da kelneroj, kaj la „strikta ordono“, ne komenci pli frue ol je la dekkvina horo! Kaj ĝis tiam ankoraŭ estis longa, longa tempo!

La urbo Villafranca ne situas ĉe la maro, sed iom interne de la lando. Tie ni vizitis la mondfaman vinmuzeon, kie ni ricevis glason da provvino kaj la uzitan glason kiel memorajon. La tieca loka Esperanto-grupo estis doninta al si grandan penon, por ekipi la multajn vidindaĵojn en la „Museo del Vino“ per klarigoj en Esperanto. Vere dankinda gesto de amikeco! Poste, ĉe la komuna vespermanĝo, estiĝis multaj malagrablaĵoj, ĉar la antaŭvidita restoracio ne havis sufiĉe da sidlokoj. Oni sin helpis per eldonado de manĝajpaketo kun botelo da ĉampano. — En apuda granda salono fine okazis la solena malfermo de la kongreso, kiu entute estis, laŭ la ĝusta konstato de la IFEF-prezidanto, vere brila sukceso pro la nelaca fervoro de LKK, pro la gastameco kaj amikeco de la hispanaj homoj kaj antaŭ ĉio pro la granda intereso, montrita de la publikaj instancoj en Barcelono, Tarragona kaj Villafranca. — Je la unua post noktomezo la ekskursanaro revenis al Barcelono — iom laca, tamen kun bonhumoro.

Krom la menciitaj komunaj travivaĵoj kompreneble ĉiu kongresano klopodis, sole aŭ kune kun siaj apartaj amikoj esplori la urbon Barcelono. Miriga la bone funkcia servo de taksioj (motorfiakroj), kiuj multnombro vigligis la stratbildon! Kiel bone gustumis la tipa manĝaĵo „Paella Valenciana“ aŭ la multbrakaj sepioj sen aŭ kun supo el ĝia tinto! Kiel bone oni povis vivi per malmulte da pesetoj! Tamen, tio validas nur por eksterlandanoj, kiuj povis aĉeti multe da pesetoj por sia propra valuto. La hispana laboristaro entute gajnas tro malmulte, por havi bonan vivtenon. Plejofte oni havas du okupojn, por sin vivteni: tage, por ekzemplo, kiel taksioŝoforo, nokte kiel noktgardisto!

Aŭ ĉu vi eble ŝatus, vin vivteni per okupo kiel ŝupurigisto? Tamen, la hispano faras eĉ tion — kaj kun mirinda fervoro kaj akurateco kaj, kompreneble, kun la ĝentileco, kiu estas suneca ĉeftraĵo de la hispana karaktero. Kaj tio estas la plej bona memorajo pri Hispanio: la rememoro al la eksterordinara gastameco kaj amikeco de la tieaj homoj! Volonte ĉiu, kiu travivis Hispanion, revenos iam denove, por revidi tiun landon kaj kunsidi kun tiuj homoj. Multan dankon al niaj hispanaj kolegoj, ke ili per sia fervorego ebligis al ni, konatiĝi kun ilia sunbrila lando! G. Korth



## Agrabla postkongreso sur la insulo Mallorca

Kontraŭe al la fakkongreso en Barcelona la postkongreso donacis al ni iom malpli da laborkunsidoj, sed des pli da allogaj ekskursoj kaj belajoj sur la „insulo de la luno kaj de la eterna somero“. Egale, ĉu oni alproksimiĝas ŝipe aŭ aeroplano: la insulo kaj ĝia ĉefurbo Palma aspektas kiel fabela lando, kiu promesas feriotagojn plenaj de ĉarmo kaj sorĉo. Vere, Majorko ne senluziĝis nin. Ĉu promenantre tra la mallarĝaj, ĉiam iom malheleltaj stratetoj de Palma, ĉu kuŝante sur la mola sablo de ĝi el la multnombraj marstrandoj, ĉu rigardante de sur roka monto tra la piniaj branĉoj al blua maro, blankaj domoj kaj preĝejoj, ĉu observante la semajnfinojn en Palma kun centoj da marĉandantaj gevendistoj, ĉu... ĉu... ĉu... ĉiam kaj ĉie ni trovis neatenditajn ravajojn. La hispanaj samideanoj donis al ni en la kongreslibro multpromesan programon, sed bedaŭrinde en diversaj punktoj ĝi estis ŝanĝata aŭ ne okazis, kiel ekz. la Esperanto-prediko en la diservelo. Tamen, la tagoj tutcerte restos neforgeseblaj kaj laŭ la proverbo „alij landoj, alij kutimoj“ oni pretervidis la malperfektecojn, kiel ekz. la „Interkonatiĝan vesperon“, kiu ĉefe konsistis el longaj samideanaj serpentoj, atendantaj kongrespapanoj kaj ekskursbiletojn. Ankaŭ la fakto, ke ekzistis LKK-anoj, kiuj ne komprenis Esperanton kaj alparolis la samideanojn en franca lingvo, estis „ereligio“, kiu ne devas okazi en Esperantokongresoj.

Kiel ĉiam oni aranĝis oficialan inaŭguron, jen en la salonego de la provinca Deputitaro. Parolis i. a. la al ni jam konata prezidanto de la Hispana Esperanto-Federacio, D-ro Herrero, en sia vigla maniero. Krome la reprezentantoj de diversaj asocioj alparolis la kongreson. Sed estis precipe la ekskursoj al Cala Blava, Manacor, Formentor kaj Soller, kiuj prezentis parton el la mirige belaj vidindaĵoj de la insulo. Cala Blava situas en la orienta parto de la golfo de Palma kaj logis al banado en la agrable varma akvo. Domaĝe, ke oni ne povis resti pli longe, ĉar la aŭtobusoj ne atendis.

Bone organizitaj estis la ekskursoj al la orienta parto de la insulo kaj al la kabo de Formentor. Tre agrable cetere, ke la omnibusoj venis al la hoteloj aŭ pensionoj por kapti la kunveturantojn, tre malagrabla, ke multaj el la kunveturantoj tion antaŭe ne sciis, ĉar nek en la kongreslibro nek dum la vendado de la ekskursbiletoj oni diris vorton pri tio. La interno de la insulo prezentis parte kiel alta montaro, parte kiel vasta ebenajo kun fruktodona grundo. Jam en la ĉirkaŭaĝo de Palma ni miris pri amaso da altaj ventomueliloj, kiuj pumpis akvon el la tero al domoj kaj kampoj. Iliaj flugiloj ofte estis multkoloraj pentritaj, tiel ke la muelfiloj donis kvazaŭ gajan aspekton al la pejzaĝo.

Poste la aŭtobusoj portis nin tra vera „edena ĝardeno“. Seninterrompe preter-

glitis kampoj kun hordeo, aveno, tritiko, terpomoj, fazeoloj, kaj ĉio tio kreskis enmeze de vastaj arbaroj de fruktoarboj, el kiuj ni vidis figojn, oranĝojn, citronojn, morusojn, karobojn, migdalojn, olivojn. Tiojn fekunda tie estas la tero, ke kvarfoje en la jaro oni rikoltas terpomojn kaj fazeolojn. Komprenible tio nur estas ebla, se sufiĉe da akvo estas je dispono. Nur la akordo de akvo kaj suno donas tiajn preskaŭ nekrediblajn rezultojn. Pro tio ekzistas senombraj akvoĉerpiloj, kies aksoj estas movigataj aŭ de motoroj aŭ de bedaŭrindaj ĉevaloj, daŭre trotantaj en cirklo, tirantaj malantaŭ si longan stangon. Ĉirkaŭ la akso turniĝas ligna rado, sur kiu kuŝas longa ĉeno de argilaj kruĉoj, kiuj ĉerpas la akvon el la profundeco kaj ĝin verŝas en sistemon de longaj kanaletoj. La kamparanoj streĉe laboris, portante ĉapelejn kun larĝaj randoj kontraŭ la suno.

Dum paŭzo en la urbeto Manacor ni havis okazon, admiri kaj aĉeti malmultekostajn teksaĵojn kiel ekz. manbroditajn bluzojn. Entute oni povas diri, ke Hispanio spite al diversaj prezaltigoj ankoraŭ estas prezalora lando por ni mezeŭropanoj. Precipe teksaĵoj ŝuoj, aliaj ledaĵoj, ornamaĵoj ktp. estas haveblaj je tre favoraj prezoj.

Ne forgeseblan travivaĵon donis al ni la stalaktitaj grotjoj de Drach. Post la varmegeco en la aŭtobusoj oni sentis sin tre agrabla en la relative normala temperaturo de la grotjoj. Kvankam laŭ amplekso ili ne estas kompareblaj kun la grotjoj de Postojna (Adelsberg) en la karstmontoj de Slovenio, ili tamen estas alioce celo vizitenda, precipe ĉar la lumigaj instalaĵoj prezentas beleĝajn efektojn. Sendube la lastaj minutoj donis la plej profundan impreson. Hispanaj kolegoj jam antaŭe estis anoncintaj, ke ni estos kvazaŭ en ĉielo. Ni sidis sur benkoj antaŭ la subtera lago Martel, kies akvo ambaŭflanke perdiĝis malantaŭ turoj de stalagmitoj kaj stalaktitoj en ia sekretplenaj kavernoj. Subite oni mallumigis la ŝtonan salonegon kaj kvazaŭ el ĉielaj sferoj eksonis delikata muziko de violinoj kaj similaj kordoinstrumentoj, kies ludantoj sidis en boato, kiu tute silente remita, glitis malrapide tra la lageto. Sekvis al ĝi du pluraj boatoj, kaj ĉirkaŭ ĉiuj tri biletis vico da blankaj elektraj ampoloj. Kvar komponaĵojn oni prezentis (el la hispana opereto s-ro Joachim, muzikaĵojn de Schubert kaj Chopin kaj la bakaronon el „la rakontoj de Hoffmann“). Estis sorĉa muziko kiel el alia mondo, kaj oni vere povis havi la senton troviĝi en la ĉielo. Des pli nekomprenible estis al la plej multaj, ke ĵus post tia unika artaĵo la Esperantohimno estis ekkantata. Tio tute ne estis signo de bona gusto. Oni lasu la himnon al decaj momentoj, sed kiam ĝi estas kantata, oni faru tion starante. Kaj ĉu la kantantoj nepre devas klaki pri la propra himno, ofte eĉ ne tre bele kantita?

Ĉu oni klakas, kiam nacia himno estas kantata?

La alia ekskurso al Formentor ĉefe donacis grandiozajn panoramojn kaj la eblecon, banadi ĉe unu el la plej famekonataj sablostrandoj de la insulo, kie grandaj rondaj pajloombreloj ŝirmis la gastojn kontraŭ la surradoj, se ili ne preferis ripozi en la ombro de verdaj pinioj, kiuj kovras la duoninsulon Formentor per densaj arbaroj. Certe neniu forgesos la ravegan belvidon de sur la pasejo inter Puerto de Pollensa kaj Formentor, de kie la rigardo vagis super abruptaj rokegoj kaj senfina, azurblua maro. Same neforgesebla la veturado sur kurboriĉa strato tra la pinioarbaroj, inter kies pintoj ĉiam novaj pitoreskaj panoramoj vidigis. Kiu krom tio havis la bonŝancon, vidi la imponan urboportegon en Alcúida (el la 14a jarcento) al la kelkcentŝtupan pilgriman ŝtuparon en Pollensa, aŭ kiu sidis en unu el la malvarmetaj keloj de Inca, ĝuante la faman vinon de la lando, tiu kompletigis la impresojn pri tiu ĉi benita insulo kiel eble plej bone en tia mallonga tempo.

Ni ne forgesu aldoni kelkajn vortojn pri Palma mem, tra kies stratetoj vagadi ĉiam denove donis novajn surprizojn. Centoj da taksioj kaj aliaj aŭtomobiloj rapide glitis tra la mallarĝaj kurvaj stratoj, kie ofte apenaŭ restis spaco por la piedirantoj. Fiakroj kompletigis la bildon kaj la trunkvila punkto en tiu viclego estis la ŝupurigistoj, kiuj por malmultaj pesetoj sorĉis „sepegulon“ sur la ledon de la ŝuoj, kompreneble nur de sinjoroj. Sinjorinoj ne rajtas purigi siajn ŝuojn enstrate. Povis esti, ke oni promenis ĉirkaŭ tri, kvar angulojn kaj subite staris antaŭ la gigantaj muroj de iu palaco aŭ de la supera gotika katedralo, kiu estas longa 120 m. Ĝi estas ekkonstruita jam en la 13a jarcento kaj laŭ la ekstera aspekto komparebla kun Notre Dame en Paris. Tamen ĉi tiu katedralo en nesuperebla maniero superregas la havenon kaj la tutan urbon. Sen ĝi Palma ne plu estus Palma. Dum iu vespero oni devas promeni de la katedralo tra la Paseo de Sagrera, laŭlonge de la haveno, kaj tie rigardi la vagantajn homojn, kiuj balbutante kaj flirtante prezentas siajn plej novajn vestaĵojn kaj salutas konatojn. Kiel granda pezaĵo estas, eniri tie kaj tie en malnovan domon kaj admiri la ofte per multaj beleĝaj floroj ornamitan internan korton. Kaj verŝajne ĉiuj, kiuj kaptis la okazon, ĉeesti la folklorajn dancojn majorkajn, por ĉiam memoros je ilia viclego, je la beleco de la danĉfiguroj kaj de la gedancintoj, je la belsono de la instrumentoj kaj voĉoj.

Palma, Majorko, insulo de la luno, jes de la luno. Eĉ kiam la aeroplano levigis alten en la vesperan malhelecon, biletis la lumoj, miloj da lumoj ĉirkaŭ la golfo de Palma, sendis lastan saluton kaj ne faciligis la adiaŭon. Iam oni devos reveni, tutcerte, oni devos reveni. GI.



## 5. Jahresversammlung der Deutschen Eisenbahner-Esperantisten vom 13. 10. bis 15. 10. 1961 in Heidelberg

Unsere diesjährige Jahresversammlung findet vom 13. 10. bis 15. 10. 1961 in Heidelberg statt. Versammlungslokal ist die Gaststätte „Brauerei Ziegler“ Bergheimer Str. 1b, etwa 10 Min. vom neuen Hauptbahnhof entfernt.

### Vorläufiges Programm

**Freitag, den 13. 10. 1961**

Nachmittags  
Sitzung des Fachausschusses  
Presseempfang

**Samstag, den 14. 10. 1961**

Vormittags  
Öffnung des Empfangsbüros  
in der Reiseauskunft des  
Hauptbahnhofs

1. Stadtrundfahrt  
Spaziergang durch die Stadt  
Besichtigung des Dr-Stellwerks im neuen Hauptbahnhof

12.30 Uhr Gemeinsames Mittagessen in der „Brauerei Ziegler“

Nachmittags  
Sitzung der Beauftragten für das Esperantowesen

2. Stadtrundfahrt  
Sofern Interessenten vorhanden: Spaziergang durch die Stadt oder Besichtigung des Dr-Stellwerks im neuen Hauptbahnhof

Esperanto-Prüfung (schriftl. Teil). Die Zulassungsbedingungen sind dem Bulteno Nr. 3/1960 zu entnehmen  
19.00 Uhr Gemeinsames Abendessen in der „Brauerei Ziegler“

20.00 Uhr Festabend im großen Saal der „Brauerei Ziegler“ (Erstattung des Jahresberichtes durch den Vorsitzenden von GEFA, Festvortrag vsl. von einem ausländischen S-ano, musikalische und unterhaltende Beiträge)

**Sonntag, den 15. 10. 1961**

Vormittags  
Gelegenheit zum Besuch des kath. Gottesdienstes  
Esperanto-Prüfung mündl. Teil  
Film- und Lichtbildervortrag vsl. im Vorführsaal des Amerika-Hauses (3 Minuten von der „Brauerei Ziegler“ entfernt)  
12.00 Uhr Gemeinsames Mittagessen in der „Brauerei Ziegler“  
Ende der Jahresversammlung. Rückreise der Teilnehmer.

Die genauen Anfangszeiten der Veranstaltungen sowie die einzelnen Programmpunkte des Festabends werden in einem späteren Bulteno bzw. im Programmheft bekanntgegeben.

Merken Sie sich schon jetzt den Termin für unsere Jahresversammlung vor! Kommen Sie alle in das schöne „Alt Heidelberg“!  
GEFA

## Internacia ferio-semajno en Herzberg apud Aarau, Svisio

En la numero 1/1961 aperis vere bonega raporto „Ferio-semajno feriojista en Herzberg (Svisio)“.

Cu vi volas partopreni la venontan semajnon de la 11-9 ĝis la 17-9-61 kaj konatiĝi kun la svisa popolo kaj kun eksterlandaj esperantistoj?

La feriodomo situas proksime de la belaspakta urbeto Aarau, riĉa je historiaj konstruaĵoj, sur la „Herzberg“ en bela kaj geologie tre interesa regiono.

Ĉiutage okazos belaj ekskursoj al la ĉirkaŭaĵo (juraso) kaj je la semajnfino estos vizito de la urbo Luzern, kie troviĝas la trafikdomo kun belegaj kaj modernaj haloj, en kiuj estas montrata tre precize la trafikevoluo de la poŝtkaleŝo ĝis la plej moderna ferovojo kaj al la radio- kaj telegrafotrafiko.

La nedevisa kaj neenkalkulita fino estos veturado al la Lago Maggiore kun tre belaj insuloj kaj tropikaj plantoj.

Prezo: Sfrs 90,— por pensio kaj ekskursoj, por la semajnfina ekskurso al

la Lago Maggiore Sfrs 25,—.  
Antaŭpago: GM 5,— enkalkulita en la supra prezo, sed ne repagenda, se oni poste ne partoprenas.

Prospektoj estas haveblaj ĉe la perantino por Germanio Margareta Kammerer, Regensburg, Bischof-Konrad-Straße 16, deĵoradreso: Büro T — Gruppe Brücken — der BD Regensburg, telefono 965/1318.

Margareta Kammerer

## Plia horaro kun klarigoj en Esperanto

Same kiel Germanio, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando nun ankaŭ niaj danaj kolegoj sukcesis, aperigi en la porklienta horaro la klarigojn en Esperanto. Do, Esperanto antaŭentemarsas en niaj rondoj! Gratulon al niaj danaj kolegoj!  
GEFA

### Esperanto kaj Geonismo

La organizantoj de la feraj kultursemajnoj en la kastelo Münchweiller apud Murten-Morat, Svislando, anonas Someran Forumon pri la temo „Tekniko, humanismo, poezio“ de 6—20 aŭgusto 1961. Detalojn petu de Svisa Esperanto-Instituto, Breitenrainstr. 12, Bern, Svislando.

### Novaj ekzamen-komisiitoj

La kolegoj Jäger kaj d-ro Lang, Frankfurt (Main), estas nomitaj, de la Germana Esperanto-Instituto, ekzamenkomisiitoj. Per tio sin montras la ebleco, disponigi pri propra ekzamenkomisiono en niaj vicoj, supoze, ke ni havos tri. Ĉar por formi kompletan ekzamenkomisionon, estas necesaj tri personoj.

### Deziras korespondi

ĉeĥa fervojisto, 27jara, celante la interŝanĝon de ĉeĥaj poŝtmarkoj aŭ bildlibroj kontraŭ gramofondisĵoj kun okeidanta dancmuziko. Adreso: S-ro Antonin Hejnar, Malá Cernná n. Orli. 62/nádraží/Ĉeĥoslovakio.

### Glumarkoj C.E.K.I.T.

Specialajn glumarkojn eldonis la Centro por Esperanto en la Komerco, Industrio kaj Turismo (placo Oberdan 1 — Milano) je prezo de steloj 2,50 po 50 ekzempleroj.

Bonvolu ilin mendi ĉe C.E.K.I.T. mem.

Franca fervojista asocio de Sangodonantoj deziras interligi kun fervojistoj-sangodonantoj el la eŭropaj landoj:

1. Organizado de la sanga transfuzo;  
2. Eventuala starigado de fervojista Asocio de sangodonantoj en la diversaj eŭropaj landoj.

Adreso: LECLERCQ Lucien F.F.E.A. — Estrarano — S.N.C.F. — V.B. 18 Rue de Dunkerque PARIS 10<sup>e</sup> — FRANCE.

Redakcio: Gerhard Korth, Mainz, Josefsstr. 8. Deĵoradreso: BOI Korth, BUVB Rentenstelle Frankfurt (Main), Kaiserstr. 48 — telefono 955/1164. Manuskriptojn bv. skribi per skribmaŝino (nur sur unu paĝo de la folio, distanco inter la linioj estu 1½). Al tradukaĵoj nepre aldonu la originalan tekston. Sendlimo 15. I., III., V., VIII., X.

Preso: Limburger Vereinsdruckerei Limburg/Lahn